N. N. 103,

Ho, venu, Spirit', Di', Sinjor'

tradukita de Albrecht Kronenberger

1.
Ho, venu, Spirit', Di', Sinjor',
por ke pleniĝu ĉies kor',
anim' kaj sent' per fajra flam',
per Via ard', per Dia flam'.
Popolon unu faris Vi
en unu sama kred' el ni
diversaj laŭ parol' kaj sang'.
Al Vi, Spirit', pro tio estu dank'.
Haleluja, Haleluja.

2.
Ho sankta lum', Dia fort'.
prilumu nin per Via vort'.
Aprezi Dion helpu nin,
elkore Patro nomi Lin,
kaj Majstro nomi Kriston nur,
fidele iri laŭ la spur'
de l' vera kredo, sen erar',
konfidi nin al Li kun malavar'.
Haleluja, Haleluja.

...

3.
Ho dolĉa konsol', brul' de l' kor',
nin helpu servi kun fervor',
sen sombro, morno aŭ malĝoj',
konstante resti sur la voj'
gvidanta nin al nia sav'.
Sen karna tim', kun ĉia brav',
per Via fort', tra viv' kaj mort'
ni fine venu, Di', al Via kort'.
Haleluja, Haleluja.

Traduko de la Germana poemo "Komm, Heiliger Geist, Herre Gott" de N. N. 103 en Esperanton de Albrecht Kronenberger *(∗1940-01-21).*

Arg-1111-2243 (2015-01-07 11:47:04)

Tiun ĉi kanto-tradukon mi, Manfred Retzlaff, trovis en ls revuo "Dia Regno", n-ro 6 (909) 2014, sur paĝo 144.